# TEJO-aktuale: numero 274, 2011-05-18

## Nova volontulo: Sébastien Denu x

La 23an de majo, la Estraro de TEJO elektis novan volontulon. Temas pri Sébastien Denŭ el Francujo. Aŭguste, li transprenos la postenon de Manuela Ronco kaj eklaboros en la Centra Oficejo. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1213

## June kaj Kune en Kopenhago: novaj informoj pri Junulara UK

La organizantoj de la junulara programo de UK diskonigis interesajn novaĵojn pri la kongreso. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1214

## Roskilde-Festivalo 25-a ĝis 4-a de Julio 2011, Roskilde, Danio

Dana Esperanta Junulara Organizo kaj FESTOKLUBO organizas senpagan esperantistan renkontiĝon en Danio dum Roskilde Festivalo, kiu estas la plej granda muzikfestivalo en Norda Eŭropo. Ĉi-jare ni invitas 70 esperantistojn al festego kun 175 muzikgrupoj. Antaŭ ol la festivalo ekos, ni havos kelkajn festajn tagojn kun babilado, ludado, interkonado - kaj iom da laboro. Legu pli: http://roskilde.festoklubo.dk/

## Mirinda Internacia Renkontiĝo (MIRO) 1a - 6a de aŭgusto 2011, Stara Sušica, Kroatio

Ĉi jare vizitu la montaran regionon de Kroatio kaj loĝu en mezepoka kastelo! :)

La 12a MIRO okazos en Stara Sušica, belega loko en la „verda koro“ de Kroatio. Ĝi estas ĉirkaŭigita per montoj, arbaroj, herbejoj kaj riveretoj – ideala loko por ĉiuj kiuj volas ĝui la someron en pura naturo.

Ni preparas plenplenan amuzan, kulturan kaj sportan programon, plibeligitan per pluraj ekskursoj tra la regiono. Por ke vi spertu la veran someran etoson de Kroatio, eblos ekskursi ankaŭ ĉe la maro!

Dum la tago spertu la naturon kaj dum la nokto bonan muzikon, trinkaĵojn kaj esperantajn interesaĵojn.

Perfekta maniero por daŭrigi viajn somerajn aventurojn...

Aliĝu kiel eble pli frue por uzi pli favorajn prezojn. Ankaŭ vi povas vidi la liston de la ĝisnunaj aliĝintoj.

Nia organizteamo estas je via dispono kaj pretas respondi al ĉiuj viaj demandoj kaj proponoj. Legu pli: http://www.keja.hr/miro/eo/index.html

### [DEJ] Kapriol' en Novjara Renkontiĝo/Novjara Internacia Semajno en Bitburg

Kapriol' en Novjara Renkontiĝo/Novjara Internacia Semajno en Bitburg.

La nederlanda muzikgrupo Kapriol' venos koncerti dum la 10-a Novjara Renkontiĝo/3-a Novjara Internacia Semajno en Bitburg, Germanio, ĉi-jarfine. La kvarpersona grupo prezentos popolan muzikon, ankaŭ malnovstilan, kaj ludos por dancigi la partoprenantojn. Marita kaj Marian dum multaj jaroj partoprenis en la muzikgrupo Kajto. Informoj pri Kapriol' kaj ilia muziko troveblas ĉe http://www.kapriol.org/.

10-a Novjara Renkontiĝo

La 10-a Novjara Renkontiĝo (NR) kunigos supozeble ĉ. 150 ĝis 200 partoprenantojn el deko da landoj, simile kiel dum la antaŭaj jaroj. Ĝi ĉi-foje okazos en Bitburg, 30 kilometrojn norde de Trier/Treviro, proksime de Francio, Luksemburgio, Belgio kaj Nederlando. Multaj el la plenkreskaj partoprenantoj de NR estas el la meza generacio, kun aŭ sen infanoj; ĉeestas ĉ. 60 infanoj inter 0 kaj 14 jaroj, la duono el ili parolas Esperanton denaske. Bonvenas homoj el ĉiuj aĝogrupoj! Datoj: 27-a de decembro 2011 ĝis 3-a de januaro 2012, http://www.esperantoland.org/nr

3-a Novjara Internacia Semajno, por junuloj kaj junaj plenkreskuloj

Antaŭ du jaroj ni komencis aparte inviti junulojn kaj junajn plenkreskulojn por havi specialan programon, Novjara Internacia Semajno (NIS). Unuflanke la iamaj infanoj fariĝis junuloj kaj la programdeziroj ŝanĝiĝis (aŭ oni komune amuziĝas sen aparta programo...). Aliflanke NIS donu jarfinan renkontiĝlokon por junuloj kaj junaj plenkreskuloj ĉe la okcidenta limo de Germanio, proksime de Francio, Belgio k.a. Ĉi-jare la domo estas aparte taŭga kaj granda, tiel ke eblos doni apartajn koridorojn al tiu celgrupo. Ekzistas i.a. kinejo, kiu ebligos prezenti filmojn dum malfruaj vesperoj. http://www.esperantoland.org/nis

Venu festi kun ni la novan jaron!

Ĉion bonan

Lu Wunsch-Rolshoven

EsperantoLand http://www.esperantoland.org

## 2-a Interlingvistika simpozio en UAM, Poznano, Polando (22-23.09.2011)

2-a Interlingvistika simpozio en UAM, Poznano (22-23.09.2011)

Interlingvistiko kaj esperantologio antau la defioj de la 21a jarcento

Ĉefaj temoj / sekcioj:

- Ĉu e-movado respondas al la defioj de la nuntempo?

- Moderna lingva priskribo de esperanto

- Modernaj metodoj en instruado de esperanto

- Nuntempa e-literaturo

- Novaj planlingvaj projektoj, konstruitaj lingvoj en la interreto

La Interlingvistikaj Studoj de UAM invitas Vin partopreni kaj kontribui al la simpozio, kiu okazos tuj post la interlingvistika sesio (kiu restartos kaze de sufiĉe da kandidatoj) kaj antaŭ la kultura semajnfino Arkones (23-25.09.) same en Poznano. Publikigo de recenzitaj kontribuaĵoj estas antaŭvidata.

Kondiĉoj:

- ne estas partoprenkotizo (pagendos nur bankedo),

- tranoktado eblos ankaŭ en studenthejmo.

Aliĝo ĉe interlin ĉe amu.edu.pl

Ilona Koutny, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Universitato Adam Mickiewicz

al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan

T: +48 61-829-36-75

hejme: +48 61-872-83-09

http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html

## [Esperantistoj] Arta programo de FESTO 2011 aliĝu rapide!

Arta Programo FESTO 2011 en Kastelo Grezijono de la 8a ĝis 15a de Aŭgusto 2011 Aliĝu tuj al FESTO por ĝui ĉi tiun porgramon!!! ĉe : http://www.festo.lautre.net/Alighilo/Alighilo
Legu pli: http://www.ipernity.com/blog/39007/326955

### Hanoja UK de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012

La Kongresa Fako de UEA fiksis la datojn de la 97-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu laŭ la pli frua decido de la Estraro de UEA okazos en la vjetnama ĉefurbo Hanojo. La 97-a UK disvolviĝos de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012.

La definitivigo de la datoj dependis de la elekto de kongresejoj, kiu povis okazi post la laborvizito de la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães al Hanojo fine de aprilo. La ĉefa parto de la kongresa programo okazos en la hotelo Meliá. La ejo de la inaŭguro kaj aliaj programeroj, en kiuj samtempe partoprenos la tuta kongresanaro, estos la Palaco de Kulturo. Ĝi troviĝas en piedira proksimeco de la hoteloj, kiujn UEA ofertos al la kongresanoj.

La preparlaboroj fare de la Loka Kongresa Komitato progresas glate kaj kun granda entuziasmo, konstatis Clay Magalhães dum sia vizito. Li konatiĝis i.a. kun eblaj kongresejoj kaj kun loĝigaj eblecoj. Li ankaŭ partoprenis en kunsido de LKK kaj pasigis multan tempon por konsili ĝiajn membrojn pri plej diversaj organizaj detaloj. KKS vizitis ankaŭ la infanĝardenon, kie okazos la 43-a Internacia Infana Kongreseto kaj kies direktorino estas aktiva esperantisto. (el Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 413, 2011-05-18, http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=413#2)

### Kino sen limoj — Internacia sendependa kinofestivalo en internacia lingvo Esperanto

La kinofestivalo okazos kune kun la TutAmerika Kongreso de Esperanto, la Brazila Kongreso de Esperanto kaj la Brazila Junulara Kongreso de Esperanto. Ne maltrafu! Legu pli: http://www.kinofestivalo.org

### Venontaj renkontiĝoj

22.06 – 26.06.2011, Bavelo kaj la Esperanto-Junularoj de Baden-Virtembergo kaj Aŭstrujo invitas, Inge.Simon ĉe esperanto.de )

Roskilde-Festivalo 25-a ĝis 4-a de Julio 2011, Roskilde, Danio, http://roskilde.festoklubo.dk/

[esperantic.org] NASK 2011: 2-10-a de julio 2011,Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD) http://esperantic.org/eo/edukado/nask .

Triobla E-Kongreso en 2011: 8-a TutAmerika Kongreso de Esperanto (TAKE), 46-a Brazila Kongreso de Esperanto (BKE), 31-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso (BEJK), de la 9-a ĝis la 14-a de julio 2011 http://easp.org.br/kongreso

[pri IJK] Esperanta Kinofestivalo, kiu okazos de la 10-a ĝis la 13-a de julio 2011 en San-Paŭlo, Brazilo dum TAKE, http://kinofestivalo.org .

44-a Konferenco de ILEI, Kopenhago, 17-23 julio 2011 http://www.ilei.info//agado/Kopenhago2011.php

Julio-17/23: Seminario kun prelegoj pri lingvo kaj edukado. Intensaj E-kursoj kaj FEI-ekzamenoj http://gresillon.org/spip.php?rubrique8

2-an teatro-staĝon en Minsko (Belarusio) http://www.dlptheatre.net

IJK, Kievo/Kijivo, Ukrainio, 14a ĝis la 21a de julio 2011 http://www.tejo.org/ijk

julio-22 kaj julio-31 je 20h30: Muzika presento de kantoj E-igitaj el itala kaj angla lingvoj: Manŭel - Emanuele Rovere, Italujo http://gresillon.org/spip.php?rubrique8

julio-23/30: Alternativa semajno (ekologio, kuracmetodoj, verda turismo). E-kursoj matene. Vegetaraj manĝoj http://gresillon.org/spip.php?rubrique8

Junulara UK en Kopenhago, Danio, 23a ĝis 30a de julio http://juk2011.wikispaces.com/

La 96-a Universala Kongreso de Esperanto, 23 - 30 de julio 2011, Kopenhago – Danio http://www.uea.org/kongresoj/uk_2011.html

Internacia Esperanto-Tago, 26a de Julio 2011 ĉe Twitter, #Esperanto

[Junulara E-Semajno] Esperanto-tendaro ĉe “Segmaŝino”/ ”Pilorama”, apud urbo Perm, Rusio, 29-31 julio 2011 http://rusio.info/sm ;

Esperanto-Studado (SES-2011) okazos inter la 30-a de julio kaj la 7-a de aŭgusto 2011, Nitra, Slovakio
http://lernu.net/SES/

3a Kulturturisma Semajno (30a de julio 2011 ĝis la 5a de aŭgusto 2011) en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio http://esperanto-urbo.de

julio-30/aŭgusto-06: Turisma semajno. Kursoj de franca lingvo kaj Esperanto matene. Ekskursoj al Luar-kasteloj posttagmeze. http://gresillon.org/spip.php?rubrique8

Mirinda Internacia Renkontiĝo (MIRO) 1a - 6a de aŭgusto 2011, Stara Sušica, Kroatio,
http://www.keja.hr/miro/eo/index.html

FESTO de la 8a ĝis la 15a de aŭgusto 2011 http://festo.jefo.fr

aŭgusto-08/15: Junulara internacia renkonto FESTO kun muzika festivalo, organizata de JEFO
http://gresillon.org/spip.php?rubrique8

Venu al la 21-a KISO por „ludi, krei, sperti vin mem” de la 15-a ĝis la 21-a de aŭgusto 2011, Marburg, Germanio
http://esperanto.de/kiso/

aŭgusto-15/24: Festa semajno por infanoj, junuloj, familioj. Post-FESTO tuj post FESTO. Muziko, gitaro, sporto, ludoj, artumado kaj E-kurso http://gresillon.org/spip.php?rubrique8

IJS 2011, 16-a ĝis la 22-a de aŭgusto, Bubanatvolgy, Hungario http://ijs.hu/eo/IJS-en-2011_eo

Torino 2011 - Nacia kongreso inter historio kaj pasio, inter la 20a kaj la 26a de Aŭgusto 2011, Italio
http://italakongreso.esperantoitalia.it/

SAT-kongreso en Sarajevo, Bosnio http://www.satesperanto.org/3-a-kongresa-bulteno.html

[instru-german] Lernfesto, seminario en Villingen, Germanio 16-18.09.2011 http://esperanto-bw.de/pages/eo/bavelo-arangoj/bavelo-seminario/invito.php

Septembro 30-oktobro 4 - TORPEDO-7: Ĉeftemo: rolo de bibliotekoj, muzeoj, kulturcentroj - praktika interagado por instruado http://esperanto-urbo.de

***
Atentu la finon de la aliĝperiodo je 2011-06-30: 1a Esperantista Migrado Autuna (EMA), 2.-7. oktobro 2011 (dimanĉe - vendrede), de Boppard ĝis Kaub, Germanio, sur la fama migrovojo "Rheinsteig" (fiksa hotelo),
http://www.esperanto.de/deb/ema2011.html

30-a Komuna Seminario, 7-10 de okt. 2011 en Seongnam, Koreio Kontakto: JUNG Eun-Kyung (ĉeforganizanto)
unika ĉe saluton.net aŭ ĉe Facebook: http://www.facebook.com/komunaseminario

[pri IJK] 35a Kataluna Kongreso de Esperanto, la 28an, 29an, 30an kaj 31an de oktobro 2011, Barcelono, Hispanio
http://www.esperanto.cat/kongresoj/2011/

Decembro 9-11 - 53a klerigsesio: literaturo, historio, didaktiko/metodiko, movadaj konoj http://esperanto-urbo.de

Komune festi la Novan Jaron: 10-a Novjara Renkontiĝo kaj 3-a Novjara Internacia Semajno, Bitburg/Germanio, de la 27-a de decembro 2011 ĝis la 3-a de januaro 2012 http://www.esperantoland.org/nr

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu

### Nova volontulo: Sébastien Denu x

La 23an de majo, la Estraro de TEJO elektis novan volontulon. Temas pri Sébastien Denŭ el Francujo. Aŭguste, li transprenos la postenon de Manuela Ronco kaj eklaboros en la Centra Oficejo. Legu pli:
http://tejo.org/eo/node/1213

### June kaj Kune en Kopenhago: novaj informoj pri Junulara UK

La organizantoj de la junulara programo de UK diskonigis interesajn novaĵojn pri la kongreso. Legu pli:
http://tejo.org/eo/node/1214

### Roskilde-Festivalo 25-a ĝis 4-a de Julio 2011, Roskilde, Danio

Dana Esperanta Junulara Organizo kaj FESTOKLUBO organizas senpagan esperantistan renkontiĝon en Danio dum Roskilde Festivalo, kiu estas la plej granda muzikfestivalo en Norda Eŭropo. Ĉi-jare ni invitas 70 esperantistojn al festego kun 175 muzikgrupoj. Antaŭ ol la festivalo ekos, ni havos kelkajn festajn tagojn kun babilado, ludado, interkonado - kaj iom da laboro. Legu pli: http://roskilde.festoklubo.dk/

### Mirinda Internacia Renkontiĝo (MIRO) 1a - 6a de aŭgusto 2011, Stara Sušica, Kroatio

Ĉi jare vizitu la montaran regionon de Kroatio kaj loĝu en mezepoka kastelo! :)

La 12a MIRO okazos en Stara Sušica, belega loko en la „verda koro“ de Kroatio. Ĝi estas ĉirkaŭigita per montoj, arbaroj, herbejoj kaj riveretoj – ideala loko por ĉiuj kiuj volas ĝui la someron en pura naturo.

Ni preparas plenplenan amuzan, kulturan kaj sportan programon, plibeligitan per pluraj ekskursoj tra la regiono. Por ke vi spertu la veran someran etoson de Kroatio, eblos ekskursi ankaŭ ĉe la maro!

Dum la tago spertu la naturon kaj dum la nokto bonan muzikon, trinkaĵojn kaj esperantajn interesaĵojn.

Perfekta maniero por daŭrigi viajn somerajn aventurojn...

Aliĝu kiel eble pli frue por uzi pli favorajn prezojn. Ankaŭ vi povas vidi la liston de la ĝisnunaj aliĝintoj.

Nia organizteamo estas je via dispono kaj pretas respondi al ĉiuj viaj demandoj kaj proponoj. Legu pli: http://www.keja.hr/miro/eo/index.html

### [DEJ] Kapriol' en Novjara Renkontiĝo/Novjara Internacia Semajno en Bitburg

Kapriol' en Novjara Renkontiĝo/Novjara Internacia Semajno en Bitburg.

La nederlanda muzikgrupo Kapriol' venos koncerti dum la 10-a Novjara Renkontiĝo/3-a Novjara Internacia Semajno en Bitburg, Germanio, ĉi-jarfine. La kvarpersona grupo prezentos popolan muzikon, ankaŭ malnovstilan, kaj ludos por dancigi la partoprenantojn. Marita kaj Marian dum multaj jaroj partoprenis en la muzikgrupo Kajto. Informoj pri Kapriol' kaj ilia muziko troveblas ĉe http://www.kapriol.org/.

10-a Novjara Renkontiĝo

La 10-a Novjara Renkontiĝo (NR) kunigos supozeble ĉ. 150 ĝis 200 partoprenantojn el deko da landoj, simile kiel dum la antaŭaj jaroj. Ĝi ĉi-foje okazos en Bitburg, 30 kilometrojn norde de Trier/Treviro, proksime de Francio, Luksemburgio, Belgio kaj Nederlando. Multaj el la plenkreskaj partoprenantoj de NR estas el la meza generacio, kun aŭ sen infanoj; ĉeestas ĉ. 60 infanoj inter 0 kaj 14 jaroj, la duono el ili parolas Esperanton denaske. Bonvenas homoj el ĉiuj aĝogrupoj! Datoj: 27-a de decembro 2011 ĝis 3-a de januaro 2012, http://www.esperantoland.org/nr

3-a Novjara Internacia Semajno, por junuloj kaj junaj plenkreskuloj

Antaŭ du jaroj ni komencis aparte inviti junulojn kaj junajn plenkreskulojn por havi specialan programon, Novjara Internacia Semajno (NIS). Unuflanke la iamaj infanoj fariĝis junuloj kaj la programdeziroj ŝanĝiĝis (aŭ oni komune amuziĝas sen aparta programo...). Aliflanke NIS donu jarfinan renkontiĝlokon por junuloj kaj junaj plenkreskuloj ĉe la okcidenta limo de Germanio, proksime de Francio, Belgio k.a. Ĉi-jare la domo estas aparte taŭga kaj granda, tiel ke eblos doni apartajn koridorojn al tiu celgrupo. Ekzistas i.a. kinejo, kiu ebligos prezenti filmojn dum malfruaj vesperoj. http://www.esperantoland.org/nis

Venu festi kun ni la novan jaron!

Ĉion bonan

Lu Wunsch-Rolshoven

EsperantoLand http://www.esperantoland.org

## 2-a Interlingvistika simpozio en UAM, Poznano, Polando (22-23.09.2011)

2-a Interlingvistika simpozio en UAM, Poznano (22-23.09.2011)

Interlingvistiko kaj esperantologio antau la defioj de la 21a jarcento

Ĉefaj temoj / sekcioj:

- Ĉu e-movado respondas al la defioj de la nuntempo?

- Moderna lingva priskribo de esperanto

- Modernaj metodoj en instruado de esperanto

- Nuntempa e-literaturo

- Novaj planlingvaj projektoj, konstruitaj lingvoj en la interreto

La Interlingvistikaj Studoj de UAM invitas Vin partopreni kaj kontribui al la simpozio, kiu okazos tuj post la interlingvistika sesio (kiu restartos kaze de sufiĉe da kandidatoj) kaj antaŭ la kultura semajnfino Arkones (23-25.09.) same en Poznano. Publikigo de recenzitaj kontribuaĵoj estas antaŭvidata.

Kondiĉoj:

- ne estas partoprenkotizo (pagendos nur bankedo),

- tranoktado eblos ankaŭ en studenthejmo.

Aliĝo ĉe interlin ĉe amu.edu.pl

Ilona Koutny, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Universitato Adam Mickiewicz

al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan

T: +48 61-829-36-75

hejme: +48 61-872-83-09

http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html

## [Esperantistoj] Arta programo de FESTO 2011 aliĝu rapide!

Arta Programo FESTO 2011 en Kastelo Grezijono de la 8a ĝis 15a de Aŭgusto 2011 Aliĝu tuj al FESTO por ĝui ĉi tiun porgramon!!! ĉe : http://www.festo.lautre.net/Alighilo/Alighilo
Legu pli: http://www.ipernity.com/blog/39007/326955

### Hanoja UK de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012

La Kongresa Fako de UEA fiksis la datojn de la 97-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu laŭ la pli frua decido de la Estraro de UEA okazos en la vjetnama ĉefurbo Hanojo. La 97-a UK disvolviĝos de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012.

La definitivigo de la datoj dependis de la elekto de kongresejoj, kiu povis okazi post la laborvizito de la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães al Hanojo fine de aprilo. La ĉefa parto de la kongresa programo okazos en la hotelo Meliá. La ejo de la inaŭguro kaj aliaj programeroj, en kiuj samtempe partoprenos la tuta kongresanaro, estos la Palaco de Kulturo. Ĝi troviĝas en piedira proksimeco de la hoteloj, kiujn UEA ofertos al la kongresanoj.

La preparlaboroj fare de la Loka Kongresa Komitato progresas glate kaj kun granda entuziasmo, konstatis Clay Magalhães dum sia vizito. Li konatiĝis i.a. kun eblaj kongresejoj kaj kun loĝigaj eblecoj. Li ankaŭ partoprenis en kunsido de LKK kaj pasigis multan tempon por konsili ĝiajn membrojn pri plej diversaj organizaj detaloj. KKS vizitis ankaŭ la infanĝardenon, kie okazos la 43-a Internacia Infana Kongreseto kaj kies direktorino estas aktiva esperantisto. (el Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 413, 2011-05-18, http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=413#2)

### Kino sen limoj — Internacia sendependa kinofestivalo en internacia lingvo Esperanto

La kinofestivalo okazos kune kun la TutAmerika Kongreso de Esperanto, la Brazila Kongreso de Esperanto kaj la Brazila Junulara Kongreso de Esperanto. Ne maltrafu! Legu pli: http://www.kinofestivalo.org

### Venontaj renkontiĝoj

22.06 – 26.06.2011, Bavelo kaj la Esperanto-Junularoj de Baden-Virtembergo kaj Aŭstrujo invitas, Inge.Simon ĉe esperanto.de )

Roskilde-Festivalo 25-a ĝis 4-a de Julio 2011, Roskilde, Danio, http://roskilde.festoklubo.dk/

[esperantic.org] NASK 2011: 2-10-a de julio 2011,Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD) http://esperantic.org/eo/edukado/nask .

Triobla E-Kongreso en 2011: 8-a TutAmerika Kongreso de Esperanto (TAKE), 46-a Brazila Kongreso de Esperanto (BKE), 31-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso (BEJK), de la 9-a ĝis la 14-a de julio 2011 http://easp.org.br/kongreso

[pri IJK] Esperanta Kinofestivalo, kiu okazos de la 10-a ĝis la 13-a de julio 2011 en San-Paŭlo, Brazilo dum TAKE, http://kinofestivalo.org .

44-a Konferenco de ILEI, Kopenhago, 17-23 julio 2011 http://www.ilei.info//agado/Kopenhago2011.php

Julio-17/23: Seminario kun prelegoj pri lingvo kaj edukado. Intensaj E-kursoj kaj FEI-ekzamenoj http://gresillon.org/spip.php?rubrique8

2-an teatro-staĝon en Minsko (Belarusio) http://www.dlptheatre.net

IJK, Kievo/Kijivo, Ukrainio, 14a ĝis la 21a de julio 2011 http://www.tejo.org/ijk

julio-22 kaj julio-31 je 20h30: Muzika presento de kantoj E-igitaj el itala kaj angla lingvoj: Manŭel - Emanuele Rovere, Italujo http://gresillon.org/spip.php?rubrique8

julio-23/30: Alternativa semajno (ekologio, kuracmetodoj, verda turismo). E-kursoj matene. Vegetaraj manĝoj http://gresillon.org/spip.php?rubrique8

Junulara UK en Kopenhago, Danio, 23a ĝis 30a de julio http://juk2011.wikispaces.com/

La 96-a Universala Kongreso de Esperanto, 23 - 30 de julio 2011, Kopenhago – Danio http://www.uea.org/kongresoj/uk_2011.html

Internacia Esperanto-Tago, 26a de Julio 2011 ĉe Twitter, #Esperanto

[Junulara E-Semajno] Esperanto-tendaro ĉe “Segmaŝino”/ ”Pilorama”, apud urbo Perm, Rusio, 29-31 julio 2011 http://rusio.info/sm ;

Esperanto-Studado (SES-2011) okazos inter la 30-a de julio kaj la 7-a de aŭgusto 2011, Nitra, Slovakio
http://lernu.net/SES/

3a Kulturturisma Semajno (30a de julio 2011 ĝis la 5a de aŭgusto 2011) en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio http://esperanto-urbo.de

julio-30/aŭgusto-06: Turisma semajno. Kursoj de franca lingvo kaj Esperanto matene. Ekskursoj al Luar-kasteloj posttagmeze. http://gresillon.org/spip.php?rubrique8

Mirinda Internacia Renkontiĝo (MIRO) 1a - 6a de aŭgusto 2011, Stara Sušica, Kroatio,
http://www.keja.hr/miro/eo/index.html

FESTO de la 8a ĝis la 15a de aŭgusto 2011 http://festo.jefo.fr

aŭgusto-08/15: Junulara internacia renkonto FESTO kun muzika festivalo, organizata de JEFO
http://gresillon.org/spip.php?rubrique8

Venu al la 21-a KISO por „ludi, krei, sperti vin mem” de la 15-a ĝis la 21-a de aŭgusto 2011, Marburg, Germanio
http://esperanto.de/kiso/

aŭgusto-15/24: Festa semajno por infanoj, junuloj, familioj. Post-FESTO tuj post FESTO. Muziko, gitaro, sporto, ludoj, artumado kaj E-kurso http://gresillon.org/spip.php?rubrique8

IJS 2011, 16-a ĝis la 22-a de aŭgusto, Bubanatvolgy, Hungario http://ijs.hu/eo/IJS-en-2011_eo

Torino 2011 - Nacia kongreso inter historio kaj pasio, inter la 20a kaj la 26a de Aŭgusto 2011, Italio
http://italakongreso.esperantoitalia.it/

SAT-kongreso en Sarajevo, Bosnio http://www.satesperanto.org/3-a-kongresa-bulteno.html

[instru-german] Lernfesto, seminario en Villingen, Germanio 16-18.09.2011 http://esperanto-bw.de/pages/eo/bavelo-arangoj/bavelo-seminario/invito.php

Septembro 30-oktobro 4 - TORPEDO-7: Ĉeftemo: rolo de bibliotekoj, muzeoj, kulturcentroj - praktika interagado por instruado http://esperanto-urbo.de

***
Atentu la finon de la aliĝperiodo je 2011-06-30: 1a Esperantista Migrado Autuna (EMA), 2.-7. oktobro 2011 (dimanĉe - vendrede), de Boppard ĝis Kaub, Germanio, sur la fama migrovojo "Rheinsteig" (fiksa hotelo),
http://www.esperanto.de/deb/ema2011.html

30-a Komuna Seminario, 7-10 de okt. 2011 en Seongnam, Koreio Kontakto: JUNG Eun-Kyung (ĉeforganizanto)
unika ĉe saluton.net aŭ ĉe Facebook: http://www.facebook.com/komunaseminario

[pri IJK] 35a Kataluna Kongreso de Esperanto, la 28an, 29an, 30an kaj 31an de oktobro 2011, Barcelono, Hispanio
http://www.esperanto.cat/kongresoj/2011/

Decembro 9-11 - 53a klerigsesio: literaturo, historio, didaktiko/metodiko, movadaj konoj http://esperanto-urbo.de

Komune festi la Novan Jaron: 10-a Novjara Renkontiĝo kaj 3-a Novjara Internacia Semajno, Bitburg/Germanio, de la 27-a de decembro 2011 ĝis la 3-a de januaro 2012 http://www.esperantoland.org/nr

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu